# Ripetado

# Opakování

# -ata, -ita, -ota, -anta, -inta, -onta

- Legata libro estas libro, kiun mi legas.
- Legita libro estas libro, kiun mi jam legis.
- Legota libro estas libro, kiun mi legos.
- Leviĝanta suno estas suno, kiu ĝuste leviĝas.
- Leviĝinta suno estas suno, kiu jam leviĝis.
- Leviĝonta suno estas suno, kiu baldaŭ leviĝos.

# -ema, -enda, -ebla, -inda

- Plorema, parolema, babilema, dormema – havi inklinon al io.
- Skribenda letero, farenda laboro – pasiva neceso.
- Nevidebla, aŭdebla, lernebla, ebla.
- Leginda, laŭdinda, rimarkinda, aminda, vidinda, vidindaĵo, memorindaĵo.

# Demandoj, respondoj

- Kiom alta (peza) vi estas?
- Kiom da tagoj havas septembro?
- Ĉu vi ŝatas glaciaĵon kun batita kremo?
- Kiam vi naskiĝis?
- Kiom kostis via pulovero?
- Kia estas botelo de vino? (plena / malplena)
- Kiun lingvon vi lernas?
- Kiom longe daŭras leciono de Esperanto? (2,15)

# Demandoj, respondoj

- Ĉu vi povos veni morgaŭ?
- Kiom foje tage vi manĝas?
- Kiu kuras plej rapide? (Ĉampiono de la konkurso)
- Bunvolu diri al mi: Ĉu vi komprenis ĉion?
- Legu: 286 802, 351 216, 424 333.
- Mazi paliĝis. Kial?

# Hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ

- Kion vi faris hieraŭ? Kiu tago estis hieraŭ?
- Kion vi faras hodiaŭ? Kiu tago estas hodiaŭ?
- Kien vi iros morgaŭ? Kiu tago estos morgaŭ?
- Hieraŭ estis bona vetero, mi promenis en parko.
- Hodiaŭ komenciĝas nova periodo.
- Se morgaŭ estos suna vetero, ni ekskursos.
- Hieraŭ mi multe laboris kaj mi laciĝis.
- Mi kudrigis novan veston, morgaŭ ĝi estos preta.